


SEPTEMBRO 2003

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

2003:5

1791 deltagare vid
88-e Universella Esperanto-
kongressen i Göteborg



ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00

E-post: sef@esperanto.se
Nätsida: www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider
dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 2003:
Direktansluten medlem 200 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar un-
der 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU, Sveriges Espe-
rantisters Ungdomsförbund.
Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av *La Espero*.
Tilläggs exemplar kostar 100 kr/år).

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Nätsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som Esperanto-Centro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Agneta Emanuelsson

Manus till *La Espero*

sänds till Leif Nordenstorm, Järnvägsgränd 11
961 76 Boden

tel. 0921-123 54

e-post: nordenstorm@hem.utfors.se

När kommer *La Espero* 2003/2004

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 6	17 oktober	17 november
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3/4	15 maj	15 juni
Nr 5	15 augusti	15 september
Nr 6	15 oktober	15 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har bråd-
skande information som måste komma ut senast ett visst
datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

Nata Bertse



Kie vi naskiĝis?

Kie vi loĝas?

En Rusio, ĉe grandega lago Bajkal en Ĉita, kie mi loĝis nur du monatojn. Poste mi translokiĝis al centra Rusio kun patrino. Mi studis la francan kaj germanan en la universitato en Lipe-
tsk je 400 kilometrojn sudoriente de Moskvo.

Kiam mi havis 23 jarojn, mi translokiĝis al Latvio, kie mi loĝis ĝis kiam mi translokiĝis al Svedio en 1992. Tie ĉi mi plejparte loĝis en Alby apud Stokholmo.

Pri kio vi laboras?

Mi laboras en Östermalmsskolan en la lerneja restoracio. Mi baldaŭ komencos ankaŭ instrui muzikon en post-lerneja vartejo (*fritidshem*).

Kiujn interesojn vi havas krom Esperanton?

Kompreneble muzikon, sed mi ankaŭ interesiĝas pri spiritaĵoj, ekzemple pri Martinus, Reiki-sanigo, budhismo k.t.p. Mi ege ŝatas labori en ĝardeno. Mi kreskigas florojn kaj fruktarojn. Mi povas fari tion en mia parcelo (*kolonilott*).

Ĉu vi havas familion?

Mi havas tri infanojn. Mia edzo Andreo estas muzikisto.

De kiam vi interesiĝas pri Esperanto?

En 1975 mi partoprenis en junulara

Esperanto-tendaro apud Leningrado. Mi tute hazarde venis tien, ne lerninte Esperanton. Mi baldaŭ lernis unu frazon: "Tio estas granda sekreto." Kiam iu demandis ion, kion mi ne komprenis, mi ĉiam respondis per tiu frazo. Estis vere streĉa lingvo-disciplino. Oni devis paroli nur Esperanton. Ŝerce ekzistis "lingvaj policistoj", kiuj kritikis tiujn, kiuj parolis nacilingve. Mi konis neniu. Vespere mi tamen kuraĝis kante france apud fajro kaj konatigis kun kelkaj homoj. La lingva disciplino tamen estis efika. Dum dektaga tendaro mi fakte lernis paroli Esperanton.

Ĉu vi havis aŭ havas iujn taskojn en la Esperanto-movado?

Mi kaj mia edzo komune aktivis Esperante. Ni partoprenis kulturajn Esperanto-festivalojn en Kopenhago, Parizo k.t.p.

Mi kutime ĉiujare instruas Esperanton en Esperanto-Domo en Lesjöfors en la somera kurso. Tion mi faris jam sep jarojn.

Ĉu ekzistas aliaj interesaj pri vi?

Mi fakte ankaŭ iom helpe instruis en la Esperanto-programo en Karlskoga popola altlernejo. Mia unua kontakto kun sveda esperantisto estis kun la tiea instruisto Lars Forsman.

Mi kantis en du musikkasedoj: "Ni kantu kune" kaj "La feliĉo".

Intervjuis Leif Nordenstorm

En tiu ĉi numero de *La Espero* mi klopodas raporti pri tio, kio okazis en UK, en IJK kaj en IJK. Tiuj ĉi mallongigoj signifas "Universala Kongreso de Esperanto", "Internacia Junulara Kongreso" kaj "Internacia Infana Kongreseto". En tiu ĉi jaro ĉiuj ĉi okazis en Svedio.

Mi klopodis raporti kiom eble plej multe el la kongresoj. Mi ankaŭ prunteprenis iom da materialo el Kongresa Kuriero, kiu aperis dum UK, sed mi tamen devas konfesi, ke mi ŝatus publikigi pli da artikoloj pri pli da temoj pri UK, IJK kaj IJK. Do, se vi opinias ke io mankas, ne hezitu verki por la venonta *La Espero*, kaj se vi jam promesis sendi materialon, sed forgesis, bonvolu sendi por la venonta *La Espero* ĝis la 17-a de Oktobro.aaaaaaaa

1791 partoprenantoj en Gotenburgo

PRETERE

Aliĝis entute
1791

kongresanoj.
Krom tio estis kel-
kaj kongresanoj,
kiuj aliĝis nur por
una tago.

Post multjara planado kaj granda laboro de multaj volontuloj okazis la 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo. Alvenis 1791 partoprenantoj el sesdekelk landoj.

Lunde okazis la solena malfermo. Partoprenis oficialaj parolantoj, ekzemple reprezentantoj de la urbo Götteborg kaj la regiono Okcidenta Gotio. La ambasadoro de Ĉinio kaj unua sekretario de la pola ambasado parolis.

UNESKO kaj la ambasadoro de Irlando sendis mesaĝojn, kiuj estis legitaj. Krome ĉeestis la konsulo de Gabono. Venis multaj salutoj, inter alie de Sture Allén, membro de la honora komitato.

Post muzika interludo parolis Franko Luin, prezidanto de Sveda Esperanto-Asocio, Roland Lindblom, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Louis Zalesky-Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto, Humprey Tonkin, direktoro de la Kongresa Temo, Profesoro Charles Durand, speciale invitita por riĉigi la kongresan temon kaj Renato Corsetti, prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio.

Mallonge salutis ankaŭ TEJO (Sonja Petrovic), ILEI (Maŭro la Torre), Akademio de Esperanto (prof. Bartosz), SAT kaj la landaj asocioj de UEA, nome: Albanio, Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Belorusio, Bosnio-Hercegovino, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉilio, Ĉinio, Danio, Estonio, Finnlando, Francio, Germanio, Hinda Unio, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Israelo, Italio, Japanio, Jordanio, Kanado, Kolombio, Koreio, Kroatio, Kubo, Latvio, Litovio, Luksemburgio, Meksiko, Nederlando, Norvegio, Pollando, Portugalio, Rumanio, Rusio, Nepalo, Slovakio, Serbio-Montenegro, Slovenio, Svedio, Svisio, Ukrainio, Usono, Venezuelo.

Post kantado de la himno La Espero Renato Corsetti deklaris la kongreson malfermita.

Janko Luin

Parolado de Louis Zalesky-Zamenhof

Estimata Sinjoro Prezidanto, Estimataj Gesinjoroj Honoraj Gastoj, Estimataj Gekongresanoj, mi salutas vin, karaj Geamikoj, karaj Gefamilianoj de la granda Zamenhofa Rondo Familia, alvenintaj al Gotenburgo por kongresi kaj por debati pri

la lingvaj rajtoj, grava kaj defendinda elemento de la homaj rajtoj ĝenerale. Okazis, ke antaŭ sesdeko da jaroj la nomo de, tiam de ni ne konata, urbo Gotenburgo aperis al mi, al mia familio, ĝuste kiel sinonimo de tiuj homaj rajtoj, kiel sinonimo de libereco. Al ni, en Varsovio tiam sub okupacio, al ni enkarcerigitaj antaŭ la fifamaj muroj, Gotenburgo egalas mondon fabelan, mondon el kiu, same kiel manao de ĉielo en tempoj bibliaj, alvenadis diversaj bongustaj manĝaĵoj kies ekzisto estis ĉe ni, tiutempe, jam de longe forgesita. Mi ĉiam memoros la nomon de la sendinto aperinta sur la pakajoj: la nomon de Einar Adamson, gotenburgano kaj esperantisto. Mi havis la ŝancon, kelkajn jarojn pli malfrue, konatiĝi persone kun la karmemora Homo, okaze de la kongreso en Malmö, la sola kiun mi sukcesis partopreni dum postmilita jardeko. Tiam mi konatiĝis ankaŭ kun la urbo Gotenburgo, kaj amikiĝis kun la tuta familio Adamson; cetere la filino de Einar daŭre estas amikino tre kara.

Pardonu, Geamikoj, la karakteron eble tro personan de ĉi tiu mesaĝo kiun mi volis esti oficiala. Ĝin konkludante, mi ŝatus deziri plenan sukceson al la 88-a Universala Kongreso nun komencanta. Mi esperas ke la rezultoj de niaj debatoj, saĝe kaj lerte de Profesoro Humphrey Tonkin gvidataj, grave kontribuos plifortigi lingvaj rajtojn, sekve la rajton al propra kultura identeco de ĉiuj komunumoj sur nia terglobo; rajtojn kies protekton celas ja nia neŭtrala lingvo Esperanto. Rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la Zamenhofstraton kondukantan al harmonia interkompreno de popoloj, kies plenrajta originlingva diverseco ne plu kaŭzu malamon reciprokajn, sed estiĝu plej valora komuna kultura riĉeco.

Enkadre de nia Universala Esperanto-Asocio ni daŭre laboru kaj batalu por la lingvaj rajtoj, sed ankaŭ, same kiel antaŭ sesdek jaroj, por la homaj rajtoj ĝenerale kaj tute specife por la rajto nenie malsati sur nia terglobo.

Ni kontribuu al la monda etoso de solidareco, ni apogu tiukampan agadon de UNESKO kaj de la Unuiĝintaj Nacioj, surbaze deniaj kun ili rilatoj, kiuj estu ne nur oficialaj, sed ankaŭ efikaj kaj konsiderintaj.

Louis C. Zaleski-Zamenhof

Mesaĝo de UNESKO al la UK

Kun granda plezuro mi, komisiito de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, hodiaŭ sendas saluton ala la partoprenantoj de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto. Kiel vi scias, UNESKO aljuĝas grandan gravecon al kunlaboro kun neregistaraj organizoj, ĉu internaciaj ĉu naciaj, ĉar ni same celas krei solidarecon kaj interkompreniĝon. Pro tio ni alte taksas niajn multjarajn rilatojn kun Universala Esperanto-Asocio, kiu ĉiam aktivis por establi ligojn inter diversaj popoloj, tiel kontribuante al internaciaj interkompreniĝoj kaj paco. UNESKO rigardas lingvojn kiel kanalojn de dialogo kaj do de interkompreniĝo. Pacaj interrilatoj inter la nacioj de la mondo nepras en la nuntempo, kaj lingvo kaj kulturo estas la ŝlosilaj elementoj de internacia dialogo. Ĉiu lingvo estas kaj esprimo de la kulturo de komunumo kaj ilo por konservi tiun kulturon por postaj generacioj. Ĉiu lingvo en la mondo prezentas unikan manieron percepti la realon. Estas danĝero, ke multaj el tiuj lingvoj, protektantoj de diverseco, malaperos dum la venontaj jaroj, se ni ne multe penos por ilin konservi.

Per tio, ke ĝi stimulas komunikmetodon, la Esperanto-movado helpas konstrui pontojn de interkompreniĝo inter diversaj popoloj kaj kulturoj. Tiun manieron Esperanto helpas montri, ke unueco kaj diverseco eblas kaj fakte necesas.

Mi gratulas Universalan Esperanto-Asocion pro tiu iniciato kaj mi deziras al la kongreso ĉian sukceson.

John Daniel, Parizo

Diverstema Internacia Kongresa Universitato

En ĉiu UK okazas Internacia Kongresa Universitato. Ne temas pri ordinara universitato, sed pri diverstemaj prelegoj pri sciencaj temoj. La prelegantoj tamen klopodas prelegi popu-

larscience, t.e. tiel ke nerfakuloj komprenu pri kio temas. La rektoro de tiu ĉi IKU estis prof. Christer Kiselman, profesoro pri matematiko en Upsala universitato kaj vicprezidanto de


Akademio de Esperanto.

Mi multe ĝuis aŭskulti plurajn prelegojn kaj mi povas konfirmi ke la prelegantoj sukcesis prelegi populare, almenaŭ tiom kiom eblis. Mi fakte malesperis ke mi neniom komprenos de la prelego de Kiselman pri "La geometrio de la komputila ekranaro", ĉar mi estas centprocenta teologo kaj humanisto, sed tamen mi sukcesis kapti almenaŭ la ĉefajn ideojn, dank' al la emo popularigi.

Ne eblas funde priskribi ĉiujn prelegojn, sed mi tamen volas menciigi ke ili temis pri: astronomio, ekonomia tutmondiĝo, komunikado tra la ĉelaj membranoj, Wilhelm Ostwald, nanoskalaj duonkonduktiloj, Manksio, komputilaj ekranaroj, sinkretismaj religioj kaj instruado de komunikaj kapabloj al medicinaj studentoj.

Kelkaj el la kursoj estis kunarango kun Akademio Internacia de la Sciencoj San-Marino, kaj tiel donis studunuojn (poentojn) al la partoprenintoj. AIS cetero organizos universitatan edukon en Esperanto en Slovakio. Pri tio La Espero raportos estonte.

Leif Nordenstorm



Christer Kiselman prelegas pri la geometrio de la komputila ekranaro.

Ĉu mankas raporto pri io en La Espero. Do, vi verku por la venonta numero! Ni bezonas pli da raportoj pri 88-a Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

Bunta arta programo ĉiuvespere

Estis bunta arta programaro en UK. Mi ŝatus prezenti ĉiun programaron per tutpaĝa artikolo, sed tio ne eblas.

Mi tamen volas menciigi la nacian versperon, kiu estis lerte prezentita de Siv Burell kaj Lars Forsman. La programo estis panoramo pri sveda kulturo de la vikinga periodo ĝis la nuno kun Svedio, en kiu enmigrintoj havas naturan lokon. Samtempe oni prezentis svedajn provincojn, de la sudo ĝis laponoj, reprezentitaj de laponoj, kiuj loĝas en la... suda duono de la lando. Multaj gotenburĝaj muzikaj kaj dancaj amatoroj partoprenis. Iu

kongresano diris ke nacia vespero estas amatoreca en la bona senco de la vorto. Bona noto!

Teatra vespero enhavis du teatraĵojn. "La kabaredo" kun Sasa Pilipovic kaj Sanja Mateic el Serbio estis komedio pri amo kaj malamo inter viro kaj virino, prezentita per muziko kaj danco. Aniara, estis surscenigo de 27 el la kantoj de Aniara, surscenigita de la polo Jerzy Fornal.

La magia spektaklo estis surscenigita de profesia grupo de magiistoj "Magic company". La kongresa libro promesis ke ili estas esperantistoj, sed

tio tute certe validis nur por unu el la grupanoj. La ceteraj iom lernis por tiu ĉi spektaklo. Ĉu mi estis kontenta? Jes kaj ne. Mi ege ĝuis la spektaklon, kiu kombinis magion kaj humoron. Mi neniam forgesos ke la grupanoj instigis ordinarajn homojn jongli per teleoroj. La rezulton vi povas imagi. Mi tamen bedaŭras ke papagismo estas tro ofta fenomeno en Esperantio. Kelkaj homoj lernas kelkajn frazojn en Esperanto por povi surscenigi ion en kongreso. Tio taŭgas por nacia vespero, sed ne por ceteraj aranĝoj. Tie ni bezonas esperantan kulturon.

Leif Nordenstorm

Noticoj el la kongreso

Raporto el la amasloĝejo

Ankoraŭ malpli konata al kongresistoj estas la voluntulino de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo (SEJU), Lovisa Gustafsson. Je la komenco de la Kongreso, Gustafsson estis sola organizante loĝejon por ĉirkaŭ 200 nepagipovaj esperantistoj. "La Internacia Junulara Kongreso ne okazis en Litovio, kiel planite, sed en la sveda urbeto Lesjöfors. Multe da voluntuloj ĉeestis en Lesjöfors kaj do ne povis veni unu semajnon poste por helpi en Gotenburgo," klarigas Gustafsson.

La SEJU-prezidantino prenis liberan semajnon de sia laboro kaj venis la 25an por prepari. "Dum la unuaj tagoj mi dormis malmulte, ĉar estis tro da laboro dum la akceptado de esperantistoj." Alvenis ĉirkaŭ 200 homoj kaj ankaŭ estis organizita por 31 homoj senpagan kurson de Esperanto. La laboro komenciĝis frue matene kaj ofte bezonas deĵoradon en la Gufujo kie eblas aĉeti drinkaĵojn kaj kukojn ĝis la 3a aŭ 4a matene.

"Post la gufujo mi estas iom laca," agnoskas la 24-jaraĝulino. Tamen ŝi forte substrekas la utilecon de malmultekosta loĝado por junaj kaj nepagipovaj partoprenantoj de la Universala Kongreso.

"SEJU jam promesis fari amasloĝejon kaj devas esti loko en UK por homoj, kiuj ne havas la monon por multstelaj kaj multekostaj hoteloj." La prezo de maksimume 50 eŭroj por tuta semajno favore komparas al la plej malaltaj gotenburgaj hotelprezoj de ĉirkaŭ 50 eŭroj po nokto. Laŭ Lovisa tiu prezidantino altiras pli da esperantistoj al la Universala Kongreso. Lovisa aparte laŭdas tiujn amasloĝantojn, kiuj voluntulis plenumi diversajn taskojn por helpi ŝin. "Multe da homoj estas ege helpemaj kaj komprenemaj. Mi fakte ĝojas fari la amasloĝejon."

SEJU faras la eksperimenton permesante homojn, kiuj ne partoprenas la Kongreson ankaŭ loĝi en la amasloĝejo. "Ni volas inviti neesperantistojn kaj homojn, kiuj volas veni kun esperantistaj geamikoj por ĝui la internacian etoson." Tamen la decido de SEJU ankaŭ permesi la partoprenadon ne nur de maljunuloj, sed ankaŭ de neesperantistoj, ricevas kritikon de diversaj flankoj. La ĉefaj plendoj estas pri la forta ronkado de viraj maljunuloj.

En mia ĉambro, je la dekstra kaj

maldekstra flanko, ili terure ronkas," agnoskas sveda junulo Janko Luin. "Tamen oni devas distingi inter ronkantajn kaj neronkantajn maljunulojn. Eble ne ĉiuj viraj maljunuloj tiom ronkas." Spite al la plendoj la vasta plejmulto forte laŭdas SEJU-n kaj ties prezidantino Lovisa. "La gufujo estas elstara, preskaŭ ĉie regas bonega etoso, la prezoj estas decaj," diras la slovaka junulo Martin Minich.

Dafydd ap Fergus
Laŭ Kongresa Kuriero

Ekonomikistoj en komerca altlernej'

Laŭ invito de IKEF 25 personoj en mardo posttagmeze vizitis la komercan altlernejon, parton de la Universitato de Gotenburgo.

Bo Sandelin, profesoro en tiu lernejo kaj membro de IKEF, unue skizis la historion kaj funkciadon de la universitato, poste prezentis la ĉefajn ekonomiajn donitaĵojn de Svedio, komparante ilin kun tiuj de la nunaj kaj estontaj membroj de Eŭropa Unio.

La kunveno finiĝis per ideo-interŝanĝo pri aktuala ekonomia problemaro.

Roland Rotsaert
Laŭ Kongresa Kuriero

Spirita sanigo

En la prelego pri "Saniĝo per spiritaj fortoj laŭ la instruo de Bruno Gröning" la kuracistino d-ro Katja Bükler prezentis la saniĝon de viro suferinta malbonan aŭdkapablon per la aŭdolinioj antaŭ kaj post la kontakto kun la instruo de Bruno Gröning. Pri pli ol 60-jara virino ŝi montris per dokumentoj de sendependaj kuracistoj pri la ostodenseco la evoluon de ostoporozo al normala ostodenseco por tiuagaj personoj. Krome raportis pri siaj saniĝoj de dorsdoloroj Harald Hombach kaj de perturboj de la manĝokutimoj.

Detlef Meier

Muziko

"Kiam mi komencis antaŭ du jardekoj ni estis la sola rokgrupo," agnoskas la relative juna Kim J. Henriksen, muzikisto de 'Esperanto Desperado'. Dum la venontaj du jardekoj,

Henriksen, dano kaj denaska parolanto de Esperanto, multe kontribuas al Esperantomuziko per sia pasia ĉarmo kaj arto. Sed ankoraŭ hodiaŭ la 42-jarulo batalas kontraŭ antaŭjuĝoj pri muziko en la internacia lingvo.

Ĉu entute Esperanto-muziko eblas? Ĉu Esperanto-muziko havas malaltan kvaliton? Henriksen konscias ke eĉ ene de la Esperanto-komunumo estas duboj pri Esperantomuziko. "La kvalito ne ankoraŭ estas samnivele," li agnoskas. "Tamen hodiaŭ ni preskaŭ speguligas la diversecon de neesperanta muziko."

Merkrede je la 8a vespere vi havos la ŝancon admiri 'Esperanto Desperado' sur la scenejo. Ankaŭ kantas Ĥomart kaj Nataŝa. Malantaŭ la sukcesa muzikprogramo staras Keiko Snarberg, respondeculino pri la junulara programo de la Universala Kongreso.

"Mi ankaŭ provis havi Dolĉamar sur la scenejo sed ili bedaurinde ne havas tempon por veni al la UK," konfesas stokholmanino Snarberg.

"Mi volas montri la diversajn stilojn de Esperanto-muziko al esperantistoj kaj neesperantoj en la fama klubo Jazzhuset." Ŝi aparte ĝojas vidi multajn neesperantistojn dum la koncerto. "Estas pli facile konvinki neesperantistojn pri la valoro de nia lingvo pere de muziko," entuziasmas Snarberg.

Dafydd ap Fergus
En Kongresa Kuriero

Diservo miksit

Diservo dum la kongreso okazis en la katedralo de Gotenburgo. Ĝi okazis laŭ la Lima liturgio, kiu havas sian nomon de la ĉefurbo en Peruo. Tie oni la unuan fojon uzis la diservordon, kiu estas kunmetita por esti uzbla en ekumenaj diservoj, t.e. diservoj kie ĉeestas homoj el malsamaj eklezioj. La Lima liturgio troviĝas en la nova diservlibro Adoru.

Gvidis la diservon kaj predikis Leif Nordenstorm. Kuncelbris Albrecht Kronenberger el Germanio. Ses esperantistoj gvidis la preĝon. Oni kantis kelkajn tipe svedajn himnojn. Ĉeestis 240 homoj.

LN

Rezolucio de la 88-a Universala Kongreso de Esperanto

La 88-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Gotenburgo, Svedujo, de la 26-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2003, en ĉeesto de 1800 personoj el 62 landoj, kaj traktinte la temon "Lingvaj rajtoj kaj respondecoj" * atentigas pri la pluraj iniciatoj kaj deklaroj de Universala Esperanto-Asocio en lastaj jaroj pri la konservado de lingva pluralismo ene de ŝtatoj kaj en la rilatoj inter ŝtatoj, kaj pri la rolo, kiun la Internacia Lingvo Esperanto povas ludi kiel efika kaj neŭtrala ponto inter la diversaj lingvoj; * notas en tiu rilato ekzemple la Manifeston de Prago (1996) pri lingva demokratio, kaj rezoluciojn de Universalsaj Kongresoj de Esperanto en Zagreb, Kroatio (2001), kaj Fortaleza, Brazilo (2002);

* konstatas,

— ke lingvoj plenumas fundamentan rolon en homaj socioj ne nur kiel iloj de komunikado sed ankaŭ kiel manieroj por esprimi sian identecon;

— ke lingva diverseco reprezentas unu el la grandaj riĉaĵoj de la homa kulturo kaj estas konservenda en la kunteksto de demokratia lingvopolitiko, kaj ke tia politiko ankaŭ liveras la lingvajn rimedojn ne nur por komunikado ene de socioj, sed ankaŭ inter la socioj;

— ke lingvaj rajtoj—nome tiuj rajtoj, kiuj rilatas al la kontentigo de komunikbezonoj kaj la esprimado de identeco en plurlingvaj situacioj—estas esenca sed tro ofte neglektata elemento en la fundamentaj homaj rajtoj;

— ke la realigo de lingvaj rajtoj estas afero ne nur jura sed ankaŭ morala, en kiu ĉiu havas respondecon partopreni; — ke tiuj rajtoj aplikiĝas, aŭ devus aplikiĝi, je ĉiuj niveloj de la homa socio, ekde la rajtoj de individuoj tra la protektado de lingvaj malplimultoj ĝis lingva egaleco en la rilatoj inter ŝtatoj;

— ke la principoj de egalrajteco kaj de demokratia komunikado postulas konservadon de la lingva diverseco en multlingvaj komunumoj, en la kadro de egaleca kaj klara lingvopolitiko, ĉar tio ebligas maksimuman socian partoprenon de ĉiuj civitanoj;

— ke manko de klara kaj aktiva lingvopolitiko malfermas la vojon al lingva dominado kaj hegemonio;

— ke eblas konservi lingvan diversecon, precipe en interŝtataj rilatoj, nur per aktiva lingvopolitiko cele al realigo de neŭtrala multlingvismo, en kiu neniu lingvo havas dominantan rolon;

* atentigas pri la multjaraj spertoj de la Esperantlingva komunumo kiel modelo de egalrajta komunikado en multlingva socio kaj pri la preteco de tiu lingvo por ludi multe pli aktivan rolon kiel pontolingvo en la rilatoj inter ŝtatoj kaj en multlingvaj sistemoj de komunikado,

* petas la diversajn Esperanto-organizaĵojn, je internacia, nacia kaj loka niveloj, kunlabori en sistema klopodo atenti pri la kvalitoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kaj konservi kaj evoluigi la lingvon tiel ke ĝi plej bone ludu sian rolon kiel transponta lingvo en multlingvaj situacioj,

* kaj alvokas al ĉiuj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, al registaroj kaj aliaj instancoj, al fakuloj kaj sciencaj organizaĵoj, kaj al ĉiuj civitanoj, kiuj deziras konservi kaj fortigi lingvan egalecon je ĉiuj niveloj, pli profunde esplori la kapablojn kaj atingojn de la Internacia Lingvo Esperanto en la rilatoj inter lingvoj kaj popoloj ĉie en la mondo kaj apliki ties lingvaj rimedojn.

Kongresanoj opinias pri la kongreso

La redaktoro de La Espero petis al kelkaj personoj rakonti pri siaj impresoj pri la Universala kongreso:

Jukka Pietiläinen, Finnlando:

Mi ege ŝatis la ekskurson al Tanum kaj al Uddevalla, la libroservon kaj la instruon dimanĉon. Mankis vespera vendado de trinkaĵoj.

Tuula Virolainen, Finnlando:

Mi multe ĝuis la IKU-prelegon pri naskalaj duonkonduklikoj.

Ole Hansen, Upplands Väsby:

Mi nur helpis pri diversaj aferoj de la naŭa matene ĝis la naŭa vespere, kaj preskaŭ ne havis tempon partopreni la programon. Mi tamen ŝatis la naci-an vesperon. Ĝi estis bone aranĝita.

Anna Landfors, Sundsvall:

Al mi plaĉis aparte la partopreno en la internacia koruso kaj la sveda vespero. Mi laciĝis ĉar mi devis piediri tiel multe en la kongresejo kaj en la urbo. Problemo estas ankaŭ ke malmultaj homoj helpas al blinduloj. Venas multaj blinduloj sen kunuloj. Do, ili estas solaj en la kongreso. Nur ege malmultaj helpas al ili. Vidu (*Anna montras*), tie estas virino, kiu samtempe gvidas tri bliundulojn. Se pli multaj helpus, estus pli bone.

Mats Landfors, Sundsvall:

Estis interesaj prelegoj. Aparte plaĉis al mi la IKEL-kunveno pri etnaj malplimultoj. La temo de la kongreso estis bona. La nacia vespeo estis amatorea, en la bona senco de la vorto. Nenio vere malplaĉis al mi.

Luigia Oberreich, Italio:

Estas bona ejo kaj sufiĉe bona etoso. Ĉiam plaĉas al mi renkonti homojn. Aparte plaĉis al mi la du teatraĵoj.

Geneviève Martin, Francio:

Preskaŭ ĉio plaĉis. Granda manko estas ke mankis en la kongreslibro laŭlanda listo de partoprenantoj. Estis tro malgrandaj budoj. Ege plaĉis al

mi vivi kun gejunuloj en bona etoso en amasloĝejo. Gotenburgo estas tre bela urbo; ne estas tro da aŭtoj.

Kaj Stridell, Surahammar:

Ĉi tiun fojon mi plej multe laboris por la amatora radiostacio. Tial mi povis malmulton partopreni. La radiostacio tamen sukcesis. Ni ĝis nun havis ĉ. 400 kontaktojn kaj en kurtondo kaj en radio per interreto. Ni ekzemple havis kontakton kun delegito en Nov-Zelando.

Kristoffer Larsson, Stokholmo:

Estas mia unua kongreso. Estas interese renkonti homojn el multaj landoj. Mi havas diversajn impresojn. Mi ŝatas la urbon Gotenburgo. Estas multaj eksterlandanoj, kaj ŝajnas ke ili estas pli bone integritaj ol en Stokholmo.

Karl Nordenstorm (10jara), Boden:

Mi antaŭvidis ke la atrakcioj en amuzejo Liseberg estus pli nervostreĉaj ol ili finfine montriĝis esti. Eĉ ne la ligna kurbfervoĵeto "Balder" estis terura.

Pri la kongreso mi aparte aprezis la komencantulan kurson, ĉar la instruisto Lars Forsman estis eksterordinare bona instruisto. Mi ŝatis ankaŭ la magian spektaklon. La ĵonglisto estis bona. Aparte amuze estis kiam oni invitis ordinarajn homojn jongli per teleroj.

Leif Nordenstorm, Boden:

Mi ege ĝojis ke mi povis partopreni kongreson post multaj jaroj, kiam mi devis resti hejme kun kreskanta aro da infanetoj. Mi ĝojis renkonti malnovajn kaj novajn amikojn. Plaĉis al mi ege multe aŭskulti la prelegojn en IKU, kaj ankaŭ la teatraĵo "Aniaro". Mi tuj relegos la libron en la sveda kaj en Esperanto. Plaĉis al mi multe la nacia vespero.

Mi estas ege dankema al ĉiuj helpantoj, kiuj ege multe helpas pri la realigo de la kongreso. Hura!

UK produktas novajn esperantistojn

Dank' al la Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo, kiu disponigas klasĉambrom en la amasloĝejo, kaj al la lerta instruisto Lars Forsman, la Universala Kongreso ankaŭ ĉijare produktas novajn esperantistojn. Forsman, aŭtoro de sep lernolibroj de la internacia lingvo, fieras pri sia nova klaso: "Ĝi estas granda kun 31 lernantoj kaj ili ege rapide lernas. Hodiaŭ, post du tagoj de lernado, ni povis paroli pri bildo kaj diskuti mallongan tekston. Ni ankaŭ studis la ki-vortojn, afiksajn kaj mi rakontis pri Zamenhof."

La klasanoj en la amasloĝejo havas tre diversajn kialojn lerni Esperanton. "Mia edzino parolas Esperanton," diras Jan Pärke. Post dek jaroj de geedziĝo kun esperantistino, li decidis eklerni la internacian lingvon. Kial nur nun? "Bona demando. Mi ne havas respondon. Antaŭe mi pensis ke estis malfacile komenci lerni Esperanton. Nun mi scias ke tio ne veras. Mia edzino kompreneble tre kontentas. Tamen ŝi baldaŭ ne povos uzi Esperanton kiel sekretan lingvon."

Polino Nina Sjöqvist loĝas en Sve-

dio ekde 1968. Ŝi ĉiam volis lerni Esperanton sed antaŭe ne havis la ŝancon. "Antaŭ du semajnoj mi vizitis amikon, kiu ne konas Esperanton, kaj hazarde vidis informon pri la Universala Kongreso." Sjöqvist fieras pro tio ke Zamenhof estis polo. "Nun mi estas tre entuziasma."

Laŭ Björn Samuelsson, Esperanto estas logika kaj bela lingvo kaj pro tio li nun studas ĝin. "Mia fratino tamen diras ke lerni Esperanton estas perdo da tempo kaj ke mi devas lerni utilan lingvon kiel la anglan." Samuelsson el Gotenburgo jam vizitis la gufujon de la amasloĝejo kaj post nur kelkaj tagoj de lernado provis paroli esperante. "Mi devis iom peni sed oni klare kaj malrapide parolis, por ke mi komprenu."

"Miaj lernantoj ĉiam diras ke la angla estas malfacila lingvo," diras Mia Larson. Ŝi studas lingvojn ĉe la gotenburga universitato kaj ankaŭ instruas la anglan. "Pro tio mi interesiĝis pri Esperanto. Ĝi estas facile lernebla." Larson konsideras Esperanton kiel bonegan helpon por lingva scio.

Instruisto Lars Forsman konscias ke kvin tagoj de klasoj ne sufiĉas por flue paroli. "Oni tamen povas akiri bonan bazon."

Dafydd ap Fergus kiu ankaŭ fotis



ÖVERSÄTTARE

Är du van och duktig på att översätta? Då kan Du hjälpa mig med att, mot betalning, översätta en 45 sidor lång artikel om Esperanto. Jag vill ha den översatt till alla nu officiella och i framtiden troligen aktuella EU-språk samt även till ryska, högarebiska, amerikanska, bengali, modern standardhindi, kinesiska och turkiska. Svar till Hans Malv, Slättervägen 9, 239 31 Skanör. Tfn 040-47 00 55.

Iom pri la 35a Internacia Infana Kongreseto

Okazis la 35a Internacia Infana Kongreseto en Lerum, Svedio, de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 2003.

Du jarojn post la grandega Infana Kongreseto en Zagrebo, okazis denove IIK. Ĝi realiĝis en apudlaga feria centro Knappekulla, en la komunumo Lerum, 18 kilometrojn oriente de Goteburgo. Loĝigo okazis en seso da lignaj dometoj, en ĉambroj kun inter 1 kaj 8 litoj. Aparta domo provizis manĝalalon kaj kunvenejon. Ĉiuj domoj estis apudaj, kaj situis nur cent metrojn for de la lago Lilla Stamsjön, kie eblis naĝi.

La lago havas sablan fundon kaj puregan akvon. Apude estas arbaro, kie eblas trovi kaj pluki bongustajn mirtelojn kaj diversajn fungojn (kantarelojn). Apude troviĝas farmbienoj

kun ĉevaloj. Estas ekstere tabloj, benkoj, kradrostejo kaj sporta tereno. Ĝi estas trankvila loko, sed ne tute izolita.

Inter programeroj estis manlaboroj, muzikado, kukbakado, paperfaldado, kvizoj kaj skeĉumado, dum ekstere estos sportoj, promenoj kaj akvo-ludoj.

Roxanne rakontas

Jag tänkte berätta lite om barnkongressen. Det här gjorde vi. Vi gick på Borås djurpark, badade, hade skatjakt. Flickorna fick lära sej självförsvar, Vi var ca 25 barn. Det yngsta barnet var ca 3 år. Vi lekte en massa lekar. Vi fick god mat. Lärarna läste högt ur en bok. Vi hade kul.

Roxanne 11 år

LINGVO

Pri la formo "ĉio ĉi"

Anstataŭ "ĉio tio ĉi" vi povas tre bone diri "ĉio ĉi", ĉar la vorto "ĉi" jam per si mem signifas proksiman montron.

L.L. Zamenhof

"Ĉio ĉi" signifas en la sveda "allt detta" aŭ "allt det här". La jena notico estas eltiraĵo el la libro "Lingvaj respondoj" de Zamenhof. En ĝi oni povas legi bonajn konsilojn de Zamenhof pri lingvouzo.

LN

DONACOJ

RONDO
LANGLET

Ĉiumonataj donacoj: Ingrid Göransson, Kalmar 200 kr; Leif Nordenstorm, Boden, 150 kr; Lenart Sundman, Västerås, 100 kr; Göran Lundgren, Stockholm, 100 kr; Tore Johansson, Kalmar, 100 kr; Signhild Johansson, Kalmar, 100 kr; Börje Andersson, Skövde, 100 kr; Bengt Nordlöf, Stockholm, 84 kr; Sten Anders Hanerz, Skotgås, 84 kr; Wim Posthuma, Västerås, 50 kr.

Se vi volas aliĝi al Rondo Langlet, kontaktu la SEF-kasiston Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-412205, e-poŝto: freds@artech.se

DONACOJ PRO UK Yngve Sörman, Årsta, 1000 kr (dua donaco); Barbro Karlström, Lysekil, 200 kr al nacia vespero kaj ekstera koncerto; Gerd Rosén kaj Ulla Ullfors, Malmö, 400 kr; Per Olov Johansson, Malmö, 500 kr; Kerstin Kristoferson, Skara, 500 kr por ĵazkoncerto; Jarl Hammarberg, V Frölunda, 100 kr; Britta Rehm, Göteborg, 1000 kr al ĵazkoncerto; Sixten Green Helsingborg, 100 kr; Anna Maria Lange, Lund, 110 kr; Åke Palm, Lim-

Raporto de IJK

Antaŭ mi venis al IJK 2003 al Lesjöfors, mi estis tre nervoza... mi neniam estis en iuj kongresoj, kaj mi ne sciis ion pri kongresoj... Sed kiam mi alvenis al Lesjöfors, kaj kiam la IJK komencis, mi nur estis feliĉa!

Mi renkontis multajn interesajn homojn kaj akiris multajn amikojn! Estis homoj el proksimume 25 landoj! Komprenoble, ĉiuj estis tre afablaj! Preskaŭ ĉiam estis prelegoj, koncertoj kaj aliaj interesaj aferoj. Ĵomart kaj Nataša de Kazahio, Dolĉamar kaj aliaj interesaj prezentadoj estis tie! Unu tagon estis ankaŭ ekskursoj kaj oni povis elekti inter kelkaj lokoj, ekzemple iri per buso al Filipstad, aŭ iri ĝis la pinto de la grandaj montoj de arbaroj. Persone, mi ege ŝatis promeni kun amiko...

Olesia Bertse

Dankon Olesia por la raporto. Ni volonte aperigos pliajn raportojn pri IJK. Skribu al la redaktoro de La Espero ĝis la 17a de Oktobro.

Reklama aviadilo

"Antaŭ ok jaroj mi eklernis Esperanton," rakontas Etsuo Miyoshi, prezidanto de la Swany Corporation kaj partoprenanto de la gotenburga UK. "Nia celo estas unu dio, unu mondo, unu lingvo." Kaj por Miyoshi, kaj por la multaj Oomotanoj, tiu lingvo estas Esperanto. "Mi ofte vekigās je la 4-a matene kaj dum du horoj mi legas en Esperanto. Vespere mi provas sekvi mian Esperanto-kurson," agnoskas Miyoshi. "Tio ne sufiĉas pro mia aĝo kaj Esperanto estas eble iom pli malfacila lingvo por japanoj."

Miyoshi forte kontraŭas la lingvan malegalecon en la mondo. "Niaj politikistoj ne kuraĝas kontraŭi ĝin. Tiurilate, Eŭropo estas iom pli forta regiono kaj ĝi povas esti la iniciato de lingva revolucio. Reklamoj devas provoki reagojn de gravuloj." Li esperas frapi politikistojn per reklamoj. "La efiko altiĝos kiel aviadilo," diras Miyoshi. "Mi forte esperas ke vekigās eŭropaj politikistoj." Miyoshi jam malavare disponigis pli ol 100.000 eŭrojn por reklamoj en la plej gravaj eŭropaj gazetoj.

Dafydd ap Fergus

Tri landoj - tri
situacioj

Sub la gvido de Michela Lipari kaj en ĉeesto de kelkdeko da interesitoj, reprezentantoj de tri landaj asocioj raportis pri la situacio de propra aganta movado.

Povilas Jegorovas el Litovio prezentis bildon tute ne imageblan por pluraj el ni: anoncoj pri kursoj faritaj per ordinaraj (senpagaj!) kanaloj allogas tiom da studentoj, ke la lernoĉambroj plenas per centoj da ili. En universitatoj la situacio samas. La nura problemo estas manko de instruistoj. Grandan laboron oni faras ankaŭ sur la eldona kampo, dum la lasta tempo ĉefe dank' al subvencioj de urbaj kaj landaj instancoj. Nu, la litova prezidanto skizis brilan cirkonstancaron por sukcesa loka agado. Alia problemo, tre bone konata al ĉiu aganta esperantisto, estas kian strategion adopti por ke la studintoj aliĝu al la movado kaj fariĝu aktivuloj?

El Japanio rakontis pri siaj aktivecoj s-ino Syozi Keiko. Pluraj el la ĉeestantoj certe sentis iom da envio: Japana Esperanto-Instituto posedas 4-etagan domon, duonparte forluitan (do

profitodonan), kie oni aktivigas eldone, instrue, propagande ktp. La japana esperantistaro estas informata pri Esperanto per 40-paĝa ĉiumonata organo "La revuo orienta". La kursoj estas kontentige vizitataj, sed la membraro nek kreskas nek malkreskas.

S-ro Claude Lougue-Epée raportisa pri la agado en Francio. Eblis konatiĝi kun tre kurioza surloka situacio, ligita kun la plej fruaj tempoj de ekzisto de Esperanto, kiam dum iama konferenco de Ligo de Nacioj, komence de la antaŭa jarcento, oni perfidis Esperanton, fuŝante tiel ĝian postan pludisvastiĝon.

Ankoraŭ nun oni batalas kontraŭ tiaj antaŭjuĝoj, firme fiksitaĵoj en la kapoj de oficialuloj; tial granda parto de la agado estas direktata al interna kaj konstanta informado al politikistoj, registaraj ministerioj, parlamentanoj de Eŭropa Unio (i.a. kun aparte kontentiga rezolucio de ĉi-lastaj). Per belaspekta du-lingva revuo la esperantistoj estas informataj pri laboroj kaj eventoj, dum sur la instrua kampo, pro la landaj leĝoj, ĉiu instruisto devas serioze engaĝiĝi por enirigi Esperanton en la lernejojn. Konklude, oni havis la impreson de tre bone organizita movado.

Tute laste alvenis raportanto el Kubo, Maritza Gutiérrez, kiu tre koncize prezentis situacion sufiĉe bonfartan. Malgraŭ la daŭre grandaj ekonomiaj malfacilaĵoj, la homoj emas lerni nian lingvon, aktiviĝi favore al ĝi, havante inter propraj celoj pliriĉigi la kulturon.

Rapide pasis du interesoplenaj horoj, spicitaj de trafaj komentoj kaj tiklaj demandoj de la gvidantino. Sed kiel konkludo, kion ni "gajnis"?

Notindas, ke la cirkonstancoj tre varias de lando al lando. Kio validas en oriento, tute ne aplikeblas en okcidento, kio aktualas en la nordo, eble malaktualas en la sudo, aŭ inverse. Do, ĉiu ĉion diritan trakribu, tenu por si tion, kio povas utili en la propra realaĵo. Ekkono de alies agadmanieroj ĉiam estas tre utila, plimotiviga kaj esperiga por efika disvastigo de Esperanto.

Elda Doerfler

Someraj kursoj en Lesjöfors trinivele

hamn, 100 kr; Karl Buremo, Jönköping, 100 kr; Lunds Esperantoklubb, 500 kr; Malmö Esperantoförening, 200 kr; I Svensson, Norrahammar, 300 kr; Rune Moln, Jönköping, 200 kr.

MEMORE AL LENNART LAGERCRANTZ
Gertrud Lund, Malmö, 100 kr.

SEF kore dankas por la donacoj. Novaj estas bonvenaj al pĝ. 2012-3.

DEZIRAS KORESPONDI

Mi estas edziĝinta kaj havas du filinojn. Profesie mi estas ekonomiinĝeniero. Miaj interesoj estas kulturo, scienco, tekniko kaj demandoj de ĉiutaga vivo. Mi kolektas bildkartojn. Mi volas korespondi kun esperantisto el Svedio: Frank Münzner, Helmholtstrasse 5, DE-08056 Zwickau, Germanio.

Okazis someraj kursoj en Esperanto-Domo en Lesjöfors. Partoprenis preskaŭ 30 homoj el la tuta lando kaj el Danio. La instruado estis en tri grupoj.

La infana kurso

En la infaneta kurso instruis Puff Östling al infanoj inter tri- kaj naŭjaraj. Pri la komencantula grupo ĉi-sube de partoprenintoj mem rakontos. Post nur kvintaga studo du komencantoj povas mem skribi revuartikoleon en Esperanto. Tio montras la facilecon de la lingvo.

La komencantula kurso

La komencantogrupo estis miksa, kaj geinfanoj kaj plenkreskuloj. Ni dividis la tagon. La matenleciono estis kune kaj post la lunĉo la geinfanoj pluiris al Puff kaj la infanetoj. Tio funkciis bone.

Ni plenkreskuloj ĝojis lerni kun geinfanoj. Ni vidis ilian fervoron, lerni kaj ĉies streĉon uzi siajn sciojn.

Anette Hedlund

Inter la lecionoj ni havis mallongan paŭzon kun kanto kaj ludo. Ni pensas ke estas bone por la geinfanoj vidi ke plenkreskuloj ne scias ĉion. Ĉiuj estas novuloj unue. Ni havis bonegan instruistinon Nataša Bertse. Dankegon Nataša, de la novuloj en Esperanto-Domo.

Kajsa Nordenstorm

Pri la kursoj en Oskarshamn

23-27 junio ni havis en Popola Altlernejo en Oskarshamn du kursojn en Esperanto. Ni havis kursanojn el tuta Svedio! Instruistoj estis Lars Forsman (por komencantoj) kaj Kerstin Rohdin (por progresantoj). Mi estis kursgvidanto de la Popola Altlernejo kaj lernanto en kurso de Kerstin Rohdin.

Samtempe kun niaj kursoj estis kurso por orgenistoj, tekstila kurso kaj kreiga kurso por kreskuloj kaj iliaj infanoj. Estis tre bona kaj arta atmosfero en la lernejo!

La lecionoj estis tre bonkvalitaj kaj agrablaj! Ankaŭ la vesperoj havis temojn. Unua vespero ni kune vizitis la faman ekologian kamparon "Bråbygden" kaj trinkis teon kaj kafon kun panon en mia somerdometo. Bona interkona vespero. Mi rakontis iome-



La paroliga kurso, kiun gvidis Anna-Maria Lange. Pri ĝi aperos pli ampleksa raporto en venonta numero de La Espero.

2004 års sommarkurs

Det är bestämt att 2004 års sommarkurs i Lesjöfors kommer att arrangeras under tiden 28 juni - 3 juli. Upplägget kommer att vara ungefär samma som i år. Mer information kommer senare.

LN

te pri la valoraj, malnovaj metodoj en la tiea terkultivado. Lars Forsman rakontis interese de lia vivo kun esperanto, kaj Kerstin Rohdin tradukis al sveda lingvo. Alian vesperon ni havis kantadon kun esperantokantoj dum uno horo. Poste ni vizitis Cecilia-kapelon en la lernejo, kune la aliaj kursanoj, kaj auskultis tre belegan koncerton en bonega Hammarberg-orgeno kun Stefan Andersson, instruisto de orgenoludado en la lernejo.

Unu tagon, posttagmeze, ni vizitis artlaborejon de mondfama lignoartisto "Döderhultar'n" kun gvidistinoj. La artlaborejo situas nur kelkaj cent metrojn de la lernejo. Unu vesperon ni havis filmprogramon.

Nia lernejestrino Lise-Lotte promesis ke ankaŭ somere 2004 la lernejo deziras aranĝi esperantokursojn en

Oskarshamn. Multe da kursanoj diris ke ili volonte revenos al Oskarshamn somere 2004 por partopreni en nova kurso. Mi ĝojas! Niaj kursoj estis kva-zaŭ daŭrigo de la Sveda Esperantokongreso 1992, kiu estis en Popola Altlernejo de Oskarshamn!

Birgitta Ekvall

UK integriĝu blindulojn

ANONCOJ

UMEA

Kuracistoj, dentistoj, flegist(in)oj, apotekistoj, veterinaroj... kontaktu al la delegito en Svedio/Norvegio por ricevi pliajn informojn pri UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio).

Komune ni fortiguan fakan asocion! D-ro Tomas Jansson, Fidtjof Nansens vei 68, NO-7020 Trondheim, Norvegio. Tel. 0047-73 53 12 15. Retpoŝte: tomas.jansson@stolav.no

INSTITUTET

Svenska Esperanto-Institutets årsmöte äger rum lördagen den 27 september 2003 kl 1230 på Masthuggsliden 1 i Göteborg. Eldona, ILEI, KELI, SEF, SEJU, SLEA har rätt att vardera sända 2 ombud. Hjärtligt välkomna! Lars Forsman ordförande SEI

Något Esperantoseminarium anordnas ej under detta kongressår.

La kunsido "Esperanto, ĉu inkluziva movado?" estis aragita pro la dubo, aparte pri blinduloj, kiel la titolo, kvankam Esperanto nomas sin "ĉies lingvo". Blinda s-ro Aldo Grassini el Italio, la ĉefparolanto, prezentis la longedaŭrecon de blindula Esperanto-movado, ekz. brajla organo "Esperanta Ligilo" de LIBE (=Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj) 100-jariĝos en 2004, kaj gvidantecon de blinduloj en la ĝenerala Esperantomovado en diversaj landoj. Li klarigis ankaŭ pri malfacilaĵoj por blinduloj en la socio kaj en la Esperanto-movado, i.a. tamen nuntempe komputilo helpas multe kaj en reta komunikado blinduloj estas bone integritaj, kvankam tio validas ne por ĉiuj blinduloj.

Sekve s-ino Kikusima Kazuko el Japanio, prezentis klopodojn en diversaj Esperanto-eventoj en Japanio: aranĝi kotiz-kategorion "handikapitoj" (sumo de rabato ne gravas) por prezenti la akceptemon; en malfermo kelksekunde informi pri ĉeesto de blinduloj; meti en dokumentujon informilon pri kontakt-maniero kun blinduloj (tiu ĉi UK faris!); organizi fakkunsidon por konigi diversajn vidantojn pri blinduloj.

En la kunsido ĉeestis 38, inkluzive de 11 blindaj (en UK mem partoprenas pli). Blinduloj prezentis sin kaj opiniojn/spertojn. Poste ankaŭ vidantoj demandis kaj komentis.

Post la kunsido venis voĉoj kaj de blinduloj kaj de vidantoj: Ĉi tian kundion UK havu ĉiujare.

Kikusima Kazuko (Krizantemo)

Kunveno de LIBE

Ĉeestis 40 personoj, inter kiuj 16 vidhandikapitoj, i.a. unuafoje du japanoj Tanaka kaj Kagaua kaj juna gajninto de konkurso de Itala Asocio de Blindaj Esperantistoj, Barbara Aceranti. Prezidis LIBE-estraranino Olena Poŝivana (Ukrainio). Post la sinprezento de la ĉeestantoj alparolis nin Povilas Jegorovas pri la perspektivoj de IKBE (Int. Kongreso de Blindaj E-istoj) en Litovio en 2005. Lin invitis la antaŭa komitatano Arvo Karvinen. Ja malmultaj estas la blindaj esperantistoj en Litovio, sed helpas Litova E-Asocio kaj la brajla biblioteko, kiu de longe produktas altkvalitajn materialojn. "Eblas lerni la lingvon en du jaroj."

KIEL KUNVIVI KUN BLINDULOJ/VID-HANDIKAPITOJ

Ni, blindaj/vid-handikapitaj esperantistoj partoprenas sen akompananto Esperanto-eventojn. Al ni necesaj helpoj estas nur tre etaj aferoj. Ni esperas ke vi, esperantistoj, helpos nin, dum Esperanto estas la lingvo por realigi la homajn rajtojn de ĉiu de la mondo.



◀ ALPAROLU UNUE DE VI

Alparolu unue de vi al blindulo. (Aŭdinte vian voĉon la blindulo povas ekscii vian ekziston kaj situon.)



◀ POR INSTRUKCII VOJON

Klarigu konkrete, ekzemple: "Iru 50 metrojn rekte kaj vi trovos ĝin en via dekstraflanko." (Ne diru "en tiu direkto". Tio komprenigas nenion.)



◀ POR AKOMPANE GVIDI

Faru ke la blindulo leĝere tenu vian brakon (aŭ ŝultron) per la mano, en kiu la blindulo ne portas la blankan bastonon. Kaj marŝu laŭ la ritmo de la blindulo, sed ne tiru la blindulon.




◀ ĈE ŜTUPARO

Ĉe ŝtuparo voĉe anoncu "Ni iros supren/malsupren." Tio helpas multe.



◀ POR MONTRI SIDLOKON

Faru ke la blindulo tuŝu la dorson de la seĝo. Per tio la blindulo komprenos la situon kaj direkton de la seĝo.



◀ POR SCIIGI SITUOJN DE OBJEKTOJ

Montru la situojn kvazaŭ ili estas sur horloĝo. Ekzemple: "Kuko estas je la tria horo." (Ne diru: "Tie.")



◀ KIAM VI FORIRAS DE TABLO

Nepre anoncu voĉe: "Pardonon. Mi iros por telefoni." ktp. Se ne, la blindulo alparolos al vi ne-estanta tie.



◀ POR TRANSDONI MONON

Transdonu monpaperojn kaj monerojn unu post unu voĉe kalkulante ilin.

● Libere kopii/traduku kaj uzu ĉi tiun flugfolion por la bono de blinduloj.

ilustris: SAVA Satiko
projektitis: JABE (=Japana Asocio de Blindaj Esperantistoj), 2001


Informfolio disdonita en Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo.

Aliflanke s-ro Karvinen rekomendis al aktivuloj aranĝi pli ampleksan kunvenon dum la pekina UK. La ĉefa espero estas tamen UK plus IKBE en Japanio 2007. Laŭdon la japana JABE, i.a. Krizantemo, ricevis pro la informilo ĉe la kongrespaperoj "Kiel vivi kun vidhandikapitoj", kiu - samkiel la dimanĉa prezento de Aldo Grassini (prezidanto de Itala E-Federacio) pri

ne-ekskluziva movado - rezultis pli da kontaktoj kun vidantaj esperantistoj. Japana e-isto japane publikigis en gazeto la libreton "Ne tiel sed ĉi tiel. Por agrablaj kontaktoj kun vidhandikapitoj" kaj JABE publikigis la prelegon de Olena Poŝivana "La sesa senso" el 1998.

Rob Moerbeek

Interesa legaĵo pri interesa lando



Hori Jasuo. Raportoj el Japanio 6. Libroteko Tokio. 2003. 168 p.

Jam aperis la sesa libro en la serio "Raportoj el Japanio", kiu traktas diversajn temojn rilataj al Japanio.

En tiu ĉi libro oni ekzemple povas lerni ke en Japanio estas 130 mil familiaj nomoj. Ĝis 1867 multaj japanoj ne havis familian nomon, sed ekde tiu jaro ĉiu devas havi tian por ke estu pli facile kolekti impostojn kaj fari konskripcio de soldatoj. Tial oni subite inventis amason da nomoj. Multaj el la japanaj familiaj nomoj enhavas la finaĵon "-da" aŭ "-ta", kiu signifas "rizkampon". Ĉu vi ekzemple rekonas Hirota, Nagata, Umeda, Akita k.t.p.?

En aliaj ĉapitroj ni povas legi ekzemple ke ekzistas malfortaj sumoo-luktistoj, ke japanaj studentoj scias ege malmulte pri kio okazis dum la dua mondmilito. Ni ankaŭ povas legi pri la scienca kapablo de lernantoj. La angla lingvo estas tre malfacila por japanoj. Tio ekzemple povas klarigi kial studentoj en universitato, kiuj studis la anglan ses jarojn antaŭ la universitato ne scias kion signifas vortoj kiel "know" kaj "want".

Raportoj el Japanio 6 enhavas 21 ĉapitrojn pri tute diversaj temoj. Ĉiuj estas skribitaj en bona Esperanto. La libro estas skribita por ke ĝi tuj estu komprenebla por eksterlandanoj.

Mi povas rekomendi la libron por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Japanio. Ĝi estas uzebla ankaŭ kiel libro por paroligaj kursoj, ĉar la tekstoj vekas intereso. Mi mem sentis ke mi volas raktonti al aliaj pri la interesajoj en la libro.

Leif Nordenstorm

Vortaro pri moderna latino

Ebbe Vilborg. Nordstedts svensk-latinska ordbok. Nordstets Ordbok. Stockholm 2001. 628 p.

Ni esperantistoj bone rekonas la nomon Ebbe Vilborg. Li verkis plurajn Esperanto-vortarojn kaj estas ankaŭ honora membro de Universala Esperanto-Asocio.

Nun aperis sved-latina vortaro de la sama aŭtoro. Ne temas pri ordinara latina vortaro pri klasika latina lingvo. Tion oni rimarkas kiam oni foliumas la vortaron kaj vidas ke kom-

putilo nomiĝas "computatrum" aŭ "ordinatrum", Germana Demokratia Respubliko "Res publica Democratica Germanica" kaj Esperanto "lingua Zamenhofiana" aŭ "lingua Esperantica". Do, temas ne nur pri klasika latina lingvo, sed ankaŭ pri nove inventitaj vortoj por modernaj aferoj.

Modernaj latinaj vortoj estis inventitaj inter latinistoj en multaj landoj, precipe en Finnlando, Italio, Hispanio, Germanio kaj Vatikano. Oni inventis la vortojn ĉar la latina ĉiam estis vivanta lingvo en tiu maniero, ke oni uzis ĝin por oficialaj dokumentoj ekzemple en la Rom-katolika eklezio kaj en diversaj universitatoj. Ekzistas ankaŭ radiaj programoj en la latina en Finnlando.

Kelkaj latinistoj volas eĉ ion pli pri la latina lingvo. Oni proponis ke la latina fariĝu internacia lingvo por uzo ekzemple en la Eŭropa Unio. Unu tasko de la recenzata libro estas prezenti la nunlatinan lingvon por ke svedoj povu priuĝi la akcepteblecon kaj la realismon pri tiuj ĉi ideoj.

Mi akceptas tuj diri mian opinion. En la gimnazio mi studis la latinan dum du jaroj. Post tio mi povas kun granda peno legi la lingvon, sed preskaŭ nenion diri. Samtempe mi studis Esperanton hejme. Esperanton mi uzas flue.

Mi ne povas ne kompari tiun ĉi vortaron kun la sved-Esperanta de la sama aŭtoro. La sved-latina enhavas 27000 vortojn kaj frazojn. La sved-Esperanta enhavas preskaŭ 50000 serĉvortojn. Ĉu tio signifas ke Esperanto estas duoble pli riĉa ol la nun-latina?

Ebbe Vilborg estu honorita ke li verkis novan sved-latinan vortaron. Ĝi estas la unua dum preskaŭ cent jaroj. Ĝi estas majstra verko, kiun povas ĝui ĉiuj lingvemuloj.

Leif Nordenstorm

Nova biblia eldono

Dum kelkaj jaroj ne eblis aĉeti Bibliion en Esperanto.

La antaŭajn eldonojn eldonis Brita Biblio Societo. La nunan eldonos la kristanaj Esperanto-societoj KELI kaj IKUE. En tiu ĉi eldono enestis ankaŭ la Deŭtero-Kanonikaj Libroj, en traduko de Gerrit Berveling.

Pri la libroservo en UK

"Malgraŭ la alta imposto kaj altaj prezoj en Svedio la vendoj ne malbonas," ĝojas Ionel Onet, ĉefo de la libroservo ĉe UEA. La ĉijara manko de volontuloj en la libroservo, laŭ la rumandevna usonano, ankaŭ kaŭzis malaltigiton en la vendado. Li jam dufoje gvidis la librovendadon dum UK, post dektrijara librovendado ĉe Esperanto-Ligo de Nordamerikio. Entute Onet antaŭvidas semajnan vendadon de ĉirkaŭ 30 000 eŭroj. "Oni iom malpli vendas rilate al antaŭaj jaroj, sed ne radikale malpli," li agnoskas.

"Ni sendis 500 titolojn, pezante ĉirkaŭ 2000 kg, de la Centra Oficejo en Roterdamo al Gotenburgo," diras Onet. Unu el la plej bone venditaj libroj estas la 'Postdomo' de la eksĉefredaktoro de la revuo 'Esperanto', István Ertl, ĵus selektita kiel tradukisto por la Eŭropa Kortumo en Luksemburgio. Ĉu ne strangas, ke la plej vendata libro dum la Universala Kongreso estas titolo tre kritika pri la nuna estraro de UEA? "Mi ne dirus ke la libro estas kritika. Ĝi estas ironia. Ĝi ne insultas. La fakto, ke ni vendas ĝin ĉi tie kompreneble ankaŭ montras, ke la libroservo ne cenzuras."

Tre bone vendiĝis kompaktdiskoj kaj vidbendoj. "Esperanto Desperado kaj Persone estis inter la plej venditaj. Eble pro la averaĝa aĝo de kongresanoj la pli laŭta rokgrupo Dolĉamar malpli vendis." Onet ankaŭ rimarkis bonan vendadon de vidbendoj. "Nep-lujunuloj emas sidi kaj spekti filmojn dum ili dormetas. Tio multe helpis la vendadon de vidbendoj. Aliflanke sonkasedoj pli kaj pli apartenas al la pasinteco."

Kiu estas la plej malbone vendita libro? "Mi ne povas diri, sed estas pluraj nevenditaj titoloj," diplomatas Onet. Memorlibroj de esperantaj famuloj estas aparte malbone venditaj. Inter tiaj memorlibroj estas 'Eseoj memore al Ivo Lapenna' je kosto de 42 eŭroj. "Eĉ ne unu mi vendis. Tio montras kiom malmulte la Esperanto-popolo interesiĝas pri niaj famuloj."

Dafydd ap Fergus
El Kongresa Kuriero



Esperanto har vind i seglen

Den Universella Esperanto-kongressen i Göteborg 26 juli-2 augusti väckte ett större gensvar i massmedia än någon kunde ana. Det tyder på att esperanto har fått vind i seglen igen.

Den kanske mest uppmärksammade artikeln var en bild som publicerades i Expressen där statsminister Göran Persson förklarade sin frånvaro från kongressen med orden "Pardonu min. Mi havas feriojn!" Vi unnar gärna vår statsminister att få njuta av sin väl förtjänade semester och kan bara konstatera att till och med en semestrande statsminister gör nytta när han uttalar sig på Esperanto.



Expressen gjorde reklam för esperanto genom att citera vår statsminister.

Likaledes uppmärksammad var en artikel i Tidningen VI under rubriken "Språksamt. De förhoppningsfullas språk." Ingemar Unge konstaterar att "esperantisterna jobbar på, i darrig medvind kan man tycka." Artikeln innehåller en hel del information och visar att författaren har bemödat sig att ta reda på fakta. Tack för det!

Tyvärr är det inte alla tidningar som bemödat sig om att ta reda på fakta innan man skriver om Esperanto. Illustrerad vetenskap påstår t.ex. i

nr. 11/2003, s. 66, att konstgjorda språk som esperanto "saknar den levande dynamik som ett naturligt språk har" och fortsätter: "Därför har ett konstgjort språk svårt att få en universell utbredning - i stället har engelska fått ta på sig den rollen." Tre ordentliga fel på några rader. Esperanto är precis lika levande som andra språk och har precis lika mycket "dynamik". Orsaken är engelska har en stark roll i dag är att Storbritannien har varit en kolonialmakt och att Förenta staterna är en stormakt. Det är inte heller sant att engelska har en universell utbredning. Sju procent av världens befolkning talar engelska som modersmål, ytterligare fem procent kan det bra och ytterligare tolv procent kan det hjälpligt eller ganska dåligt. Sjuutiosex procent kan det inte alls.

Vi hoppas att Illustrerad vetenskap skriver mer om esperanto, efter att ha tagit reda på mer fakta.

Många andra tidningar har publicerat artiklar i samband med kongressen. TT distribuerade en liten artikel om esperanto där läsarna fick lära sig några enkla meningar. Den artikeln publicerades i många tidningar, bl.a. i Metro (Göteborgsversionen.)

Dagens Nyheter publicerade en artikel skriven av en av sina Göteborgsmedarbetare. Artikeln publicerade både på svenska och i översättning till esperanto.

Lokalradion i Göteborg sände vid ett flertal tillfällen intervjuer med medarbetare i den lokala kongresskommittén. Flera olika tevebolag fanns också med vid kongressen. Korta inslag har redan sänts i olika program. Ett litet längre inslag kommer under hösten att sändas i teveprogrammet Kobra.

Maximilian Moll från den fransktyska tevekanalen Arte följde kongressen under flera dagar och visade särskilt intresse för familjer med esperantotalande barn. Ginanne Brownell, journalist från den amerikanska Newsweek besökte också kongressen


och rapporterade från denna.

Ännu är det inte för sent att uppmärksamma massmedia om kongressen. Personliga kontakter är ofta bäst. Alla som har varit med på kongressen eller som fått besök av utländska esperantister i som reser runt i Sverige kan ta kontakt med massmedia och föreslå en intervju.

Det förekommer också givetvis att ironiska och/eller helt felaktiga påståenden om esperanto publiceras. I dessa fall är det för det mesta möjligt att få en rättelse eller ett genmäle. Med trevlighet kommer man långt.

Som sista exempel på en artikel vill La Espero visa en liten uppmaning hämtad ur Göteborgsposten: "Sjung en bit på esperanto!" Det är vår nationalsång "Vi alta libera", även känd som "Du gamla du fria" som publiceras i A. Koffmanns esperantoöversättning.

Leif Nordenstorm



Filmaren Benjamin Jonsson och reportern Maria Sleszcynska från programmet Kobra under deras besök vid kongressen. Nedan: Artikel i Göteborgsposten.

Sjung en bit på esperanto!

Göteborg pigre jar nu en internaciana Esperanto-kongreso. Nur ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn.

Venite, libere, multajn kantojn, ni gajnos, ĉi tie ĉi tie!

Sufiĉe al ti, ni ni ĉi tie ĉi tie!

al via esperanto! ĉi tie ĉi tie!

Vi trovas ĉi tie ĉi tie ĉi tie. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn.

Sing, ĉi tie ĉi tie ĉi tie. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn. Ĝuste ĉi tie oni trovas multajn esperantistojn.